**LA DEK DU de Aleksandr Blok** (1889-1921) **en traduko de Gerrit Berveling (Nederlando) aperis en FONTO nr 141 septembre 1992**

**1**

Nigra vespero.
Blanka neĝo.
Kaj vento, ho vento!
La homoj ne tenas sin surpiede.
Kaj vento, ho vento!
En la tuta mondo de Dio!

Kirlas la vento
La blankajn neĝerojn.
Sub la neĝeroj – la glacio.
Glitiga, peza,
Je ĉiu ekpaŝo
Ekglitas – aĥ!–, kompatindulo!

De dom' al domo
Oni etendas ŝnuron.
Kaj surŝnure sloganon:
«Ĉiu potenco al la Konstitucia Kunveno!»

Oldulino ĉagreniĝas – ploras,
Neniel ŝi kaptas, kion signifas ĝi,
Por kio do ĉi afiŝo,
Ĉi giganta tukego?
Kiom da piedvindoj estus por infanoj,
Al ĉiu mankas vestoj, ŝuoj ...

La oldulino, kvazaŭ kokino,
Iamaniere implikiĝas en la neĝamaso.
Ho, Panjo Maria, protektu min!
Ho, la bolŝevikoj min altombigas!

Vipas la vento!
La frost' ne malkreskas.
Je vojkruciĝo burĝo
Kaŝas nazon enkolume.

Sed, kiu li estas? – Longajn harojn,
Kaj li parolas duonvoĉe:
– Perfiduloj!
– Pereis Rusio!
Devas esti verkisto
– Revulo ...

Kaj jen longbaskulo –
Flankemulo – post ĉi neĝamaso ...

Kial nune vi ne gajas,
Kamarado popo?

Ĉu vi memoras, kiel vi iris
Kun la ventro antaŭen,
Kiel brilis kun la kruco
La ventro meze de l' popol'?

Jen sinjorino en astrakano
Sin turnas al alia:
– Kiom mi ploris, ploris ...
Sxi glitfalas
Kaj – baf! – etendiĝas!

Aj! Aj!
Tiru ŝin, levu ŝin!

La vento gajas
Maligna, petola,
Fuŝas faldojn,
Falĉas pasantojn,
Ŝiras, taŭzas, trenas
La egan sloganon:
«Ĉiu potenco al la Konstitucia Kunveno!» ...
Kaj eĥas la vortojn:
... ankaŭ ĉe ni estis kunveno ...
... tie ĉi en ĉi konstruaĵo ...
... oni diskutis ...
Oni decidis:
Por certa tempo – dek, por nokto – dudek kvin ...
... kiom eble malpli por ĉiu ...
... ni iru dormi ...

Malfrua vespero.
Malpleniĝas la strat'.
Unu vagabondo.
Kurbiĝas.
Kaj fajfas la vento ...

Hej, povrulo!
Venu do –
Ni kisu nin ...

Panon!
Kio okazas ĉi tie?
For! For!

Nigra, nigra ĉielo.

Kolero, – tristega kolero
Bolas enbruste ...
Nigra kolero, sankta kolero ...

Kamarado! Rigardu do,
Atentu bone!

**2**

Vent’ promenas, neĝx’ kirliĝas,
Dek du homoj sin dediĉas.

Nigras la fusil-rimen’,
Fajroj jen kaj jen kaj jen ...

Cigar’ tradente, ĉap’ heroa,
Mankas nur la as’ karoa!

Libereco! Libereco!
Sed ja sen la kruco!

Tra-ta-ta!

Fridegas, kamaradoj, fridas!

– Kaj Vanka kun Katja en kafejo ...
– Siajn monerojn ŝtrumpe ŝi portas ...
– Vanjuŝka nun ja ege riĉas ...
– Vanka estis unu el ni, nun soldato ...
– Nu, Vanka, vi hundido, burĝo!
Provu kisi mian knabinon!

Libereco! Libereco!
Sed ja sen la kruco!
Katja estas okupita – kun Vanja –
Per kio do, per kio? – okupita?

Tra-ta-ta!

Fajroj jen kaj jen kaj jen ...
Nigras la fusil-rimen’.

Tenu la paŝojn revoluciaj!
‘stas malamikoj ne inerciaj!

Ek, kamarado, kun la fusil’ vi!
Sanktan Rusion pafu do for ni! –

La grasan
La klasan
La dikpugan!

Sed ja sen la kruco!

**3**

Kiel ekiris niaj knaboj

servi en la gvardio ruĝa
servi en la gvardio ruĝa –
Ho kiel impetaj kapoj!

Dolĉamara ekzalto!
kia vivstilo!
ĉifona palto,
Aŭstra fusilo!

Je ĉagren' de ĉiuj burĝoj
mondbruligon fari urĝas!
Mondbrulig' kaj sanga ŝlim' –
Ho Sinjor', kompatu nin!

**4**

Negxo kirliĝas, knaras la sledo,
Flugas Vanka kune kun Katja –
Elektra lanterno
Surtimone ...
Aĥ aĥ, sprone ...

Li en uniformo soldata
Kun iom stulteta vizaĝo
Tordas, tordas la lipharojn
Kaj ridetas
Kaj ŝercadas ...

Kia Vanka – larĝe ŝultra!
Kia Vanka – vort-tumulta!
Katjan ĉirkaŭbrakas,
Kaŝparolaĉas ...

Malantaŭen la kapon ŝi ĵetas,
La dentoj perle koketas ...
Aĥ vi, Katja, mia Katja,
Kun vizaĝo via plaĉa ...

**5**

Ĉi cikatro kola, Katja,
de l' tranĉil': apenaŭ ĉesis:
jen denove bruste, Katja,
al vi jam gratvundo freŝas!

Hej ho dancu, eta!
kiel ĉarmas la kruretoj!

blankan punton vi montradis –
ho paradu vi paradu!
oficirojn vi logadis –
ho flirtadu vi flirtadu!

Hej ho flirtu, eta!
kor’ enbruste doloretas!

Vi memoras l’ oficiron,
Katja; – tranĉil’ trafis lin ...
Vi forgesis, ho vampiro?
ĉu memor’ ne freŝas vin?
Hej ho freŝu, eta!
kun mi liten jam impetu!

grizajn vi gamaŝojn ŝatis,
pri bombonoj delikatis,
kun kadetoj vi rilatas – –
nun kontentas pleb-soldate?

Hej ho peku, eta!
malpeziĝos la koreto!

**6**

... ree la sledo alhastas insiste,
Flugas kaj hurlas, sakras stiristo ...

Help’, Andrjuĥa! Haltu! Haltu!
Ek, Petruĥa: post lin saltu!

Traĥ-tararaĥ-taĥ-taĥ-taĥ-taĥ!
Leviĝas ĉielon neĝo-zigzag’ ...

Foren, kun Vanka, sledo lontanen ...
Ree do foje! Streĉu ĝin ĉane!

Traĥ-tararaĥ! Ĉu plu inklino
........
Promeni re kun alies knabino?

Eskapis la fia! Tute ne gravas:
Morgaŭ la kontojn kvitaj ni havos!

Sed Katja – kie? – Morta! Morta!
Kun en la kapo kuglo morda!

Kontenta, ĉu, Katja? – Sen sono
vi kuŝas nun en neĝo, fripono.

Tenu la paŝojn revoluciaj!
‘stas malamikoj ne inerciaj!

**7**

Kaj denove la dekduo
iras, ŝultre pafilŝtalo –
al la ĵusa mortiginto

‘stas vizaĝo mortopala ...

Ĉiam pli kaj pli hastigas
li la paŝojn en ekscito,
ĉirkaŭkole tukon ĉifas –
li neniel konsciiĝas ...

– Kamarad’, ĉu vi ne gajas?
– Ho amik’, vi kial sombras?
– Hej Petruĥa, amuziĝu! –
ĉu pri Katja vi funebras?

– Aj amikoj, kamaradoj,
ĉi knabinon mi amegis ...
Nigrajn noktojn tut-ebriajn
kun ŝi kune mi pasigis ...

– Ulo, for ĉi gurd-orgeno!
Kio, Petka: ĉu vi – in’?
– Ĉu pro tia aĉa spleno
turnu sin via anim’?
– Estu firma la mieno!
– Restu sub propra reĝim’!

– Vere nun ne estas tempo
por dorlota sinvartado!
Ŝarĝo jen ja nin atendas
peza, kara kamarado!

Kaj Petruĥa malakcelas
siajn rapidegajn paŝojn ...
Kapteniĝo re modelas,
ree li jam fajfas gaje ...

Aĥ! Aĥ!
Amuziĝo ne estas pek’!

Nun vi baru viajn hejmojn!
Rabo donos egajn gajnojn!

**8**

Ho vi, ĉagren’ amara!
Enuo enua,
Vivdetrua!

Mi tempeton
vivos plu vivos plu ...

Mi verteton
gratos plu gratos plu ...

Mi semetojn
pinĉos plu pinĉos plu ...

Mi tondileton
prete pretigos plu ...

Flugu vi, burĝo! Kiel pasero!
Vian sangon mi soifas
Pro l' kara malnova,
Pro la nigrabrova ...
Donacu, Sinjoro, pacon al ŝi ...

Fi! Enue!

**9**

De l' urbo ne bruas plu sonado,
Silento regas sur Neva-turo,
Ne premas plu policist-gvatado –
Senvine ja ankaŭ estos plezuro!

Ĉe vojkruciĝo burĝo staras
Kaj kaŝas nazon en la kolumo.
Kun hirta hararo al li paras,
La voston kuntirinte, laca hundo.

Staras la burĝo, hundo malsata,
Staras sensone, kvazaŭ demando.
Kaj la malnova mond', hund' neamata,
Staras post li, voston intergambe.

**10**

Furiozas neĝoŝtormo,
Ho neĝŝtormo, neĝŝtormo!
Je kvar paŝxoj eĉ ne eblas
vin plu vidi en ĉi ŝtormo!

Neĝ' funele diskirliĝas,
Neĝkolono jen leviĝas ...
– Ho la neĝturbulo! Dio!
– Petka! Hej, ne frenezumu!
Ĉu vin savis de fia okazo
Iam la ora ikonostazo?
Senpripensul' vi estas, brave,
Ho pripensu, juĝu prave: –
Ĉu ne manoj malpuras aĉe
Sange, pro l' amo al via Katja?

– Tenu la paŝojn revoluciaj!
'stas malamikoj jam proksimaj!
Antaŭen, antaŭen, antaŭen,
Laboristaro, antaŭen!

**11**

... Tiel pasas sen Dia beno
La dek du, tra fora strato,
Pretaj je ĉio sen problemo,
Senbedaŭre, sen kompato ...

Serĉas la tuboj de la pafiloj
Malamikojn kiuj kaŝas sin ...
En la obskura strata trankvilo
Kie nur la neĝŝtormo montras sin ...
En la lanuga neĝa pelmelo,
Kiel la botoj ade implikas sin ...

Flirtiĝas
Ruĝa flag'.

Aŭdiĝas
Ritma paŝ'.

Jen – vekiŝas
Malamikaĉ'.

Neĝoŝtormo plenablove
Ŝutas kovre
Tage, nokte ...

Antaŭen, antaŭen,
Laboristar', antaŭen!

**12**

... Plu ili iras kun paŝ' konfida ...
– Kiu kaŝiĝas tie? Aperu! –
En la ruĝa flago nur hide
Furiozas antaŭen la vento ...

Jen transe – neĝ' amasa,
– Kiu do, en ĉi neĝamas'? Aperu! –
'stas hund' malsat-malgrasa
Kiu postlamas en silento ...

– Formalaperu, hundo rabia!
Perbajonete mi vin batos!
Malnova mond', hundo skabia,
Same ekkrevu – niatrafe!

... Ĝi rikanas, kiel lup' vorema –
Fermas la voston inter la kruroj –
Hund' perdiĝinta – hundo senhejma ...
– Hej, kiu paŝas tie ĉe l' mur?

– Kiu skuas per ruĝa flageto?

– Streĉu l’ okulojn tra la tenebro!
– Kiu jen iras kun hastaj paŝetoj?
Kiu postdome kaŝas sin febre?

– Negrave, mi tamen vin kaptos.
Kapitulacu viva, prefere!
– Hej, kamarad’, do elrampu,
Eliru aŭ mi pafos vin teren!

Traĥ-taĥ-taĥ! – Kaj nur la eĥo
Reagas inter la domoj ...
Nur neĝŝtormo kun rida blek’
Inter la neĝaj fantomoj ...

Traĥ-taĥ-taĥ!
Traĥ-taĥ-taĥ ...

... Jen ili iras kun paŝ’ konfida,
Postlamas nur la malsata hund’.
Antaŭen, kun flago sangoavida, –
Kaj nevidebla neĝxblovade,
Netuŝebla per-pafade,
En paŝado ne-ĉitera,
En nombo perla el neĝeroj,
Iras meze de roza diadem’
Jen antaŭe: Jesu’ Kristo mem!

(Januaro 1918)